Jarkolekto : 2014 | Numero : 3 | Paĝo : 1

# La *Voĉo de Amikejo*

Informilo pri **Senlime** kaj **Esperanto** en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

**Senlime**
Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française

**En cas de non-distribution, renvoyer à**
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org

**Editeur responsable**
**Responsa eldonanto +**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jacques@senlime.org
Esperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe www.senlime.org**

**Prezoj por BE, NL kaj DE :**
**Unuopa n-ro : 4 EUR**
**Jara abono : 12 EUR**

Bonvolu pagi, prefere antaŭ la jarfino, **NUR** al la konto :

IBAN : **BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)
de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

La jara kotizo al ***Senlime*** (10 €) estas disigita de la abono al la papera versio de nia informilo (12€).

## ENHAVO :

**p. 1 : Enkonduke…**
**p. 2 : Niaj programeroj lupee**
**p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2014-2015 (1/2)**
**p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo**
**p. 5 : Kongreso en Polleur kaj Homaj Rajtoj**
**p. 6 : Verviersa angulo: Droits de l'Homme**

## Lingvaj aktualaĵoj mallonge

Franc-devenaj veturantoj estas "viktimoj" pro la obstino de la Flandraj aŭtoritatuloj, kiuj obstine sendas al ili pagendajn monpunojn pro troa rapidumo (dum la ferioj en Belgio) nur en la nederlanda lingvo.

En Menin, flandra urbeto proksima de Valonujo kaj Roubaix (Francio), la multnombraj francparolantoj nun devos sin esprimi per gestoj kaj desegnoj aŭ en la nederlanda (decido de la urba komunumo)!

La Brusela urbo adoptis novan planon (nomitan «Marnix») por instigi la enloĝantojn lerni la lingvojn (evidente ne esperanton). Ĝi konsistas el ttt-ejo (www.planmarnix.org), elektronika novaĵ-letero kaj unu publika evento jare.

Aviadiloj nepre devas alteriĝi kaj forflugi el la aerhaveno de Zaventem (apartenanta al la Flandra-nerlandlingva regiono) brue kaj malalte pasante super Valonujon (franclingva) kaj la Bruselan urbon (kompreneble en la Brusela, oficiale dulingva sed ĉefe franclingva!).

La kantisto konkurinta por Belgio dum la «U.S.E.-Song-Contest» («Eurovision» - nun tute anglalingva!), ĉi-jare elektita de Flandrio estis Axel Hirsoux, franc-parolanto: miraklo! Sed ne sekvos dua miraklo: kvankam ankaŭ li kantis en la angla, li estis tuj eliminita!

Hieraŭ (24an de majo), balota tago–1, mortiga pafado en la juda muzeo de Buselo… Restas al ni multon, multon por fari!

# Niaj programeroj lupee

## *detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…*

**Memor-vespero pri la homaj rajtoj**

En septembro 2014, ni festas la 225-an datrevenon de la "Deklaracio pri la Homaj kaj Civitanaj Rajtoj en Franchimont" kaj la 25-an datrevenon de la kreo de memoriga "Vojo pri la Homaj Rajtoj", lime de la iama markizejo (pasanta en Verviers) kaj al kiu multaj esperantistoj partoprenis kadre de "Trilanda renkontigho".

*Antaŭe la markizejo de Franchimont [franka monto] estis Lieĝa tero, akvumita de la rivero "Hoegne" [Honj] kaj kontrastita ejo dividita inter malriĉa kampara medio kaj industriaj polusoj, de kiuj la urbo Verviers estas fama ekzemplo. En la reto de la sociaj streĉiĝoj kaj la tumulto de la kulturaj spacoj, kaŭzitaj de la malrapida daŭro de la arkaismoj kaj la dinamismo de la disvastiĝoj, estis loko por demokratia prizorgo: 1789 estas unu el ĝiaj decidaj malordoj.*
*Vere, la historio de la markizejo de Franchimont montras al ni, ke ne ekzistas magranda historio, sed rakontoj kiuj interkovriĝas kaj integriĝas en pli larĝajn hori-zontojn de kompreno, sintezaj klopodoj kie serĉado de identeco neniam forestas, nutrita de la konscio de la homoj pri kiuj temas, sed kiuj ankaŭ estas civitanoj. Franchimont-aj vojoj kiel historiaj vojoj, kiel ĝiaj senfinaj ondumoj, estas plenaj je memor-aĵoj kiuj, asimilitaj, fine havas la superegan guston de la libereco.*

Philippe **Raxhon**

**09-19** 20h00 : BE-Kelmis, Select: "**Vespero pri la Homaj Rajtoj**".

**Konversaciaj tabloj**

Denove, post la «somera paŭzo», ***Senlime*** proponas al siaj membroj konversaci-tablojn, bona rimedo por perfektiĝi en esperanto.

Tiaj konversaci-tabloj jam de pluraj jaroj funkcias per plej diversaj lingvoj, interalie en Vervierso (ili ricevis la Eŭropan markon pri lingvoj en 2002).

Ili arigas minimume 2 aŭ 3 personojn kun baza kono de la celita lingvo kaj animanto (kun – pli - bona lingva nivelo), kiu proponas temojn kaj uzas fakajn teknikojn kaj materialon. Ofte li aŭ ŝi apogas sin sur la vivspertoj kaj sentoj de la partoprenantoj.



En septembra Kelmiso, du temoj estas tuj evidentaj: raporto pri la ferioj, evoluo de nia asocio (la malkresko de la membraro kaj de la ĉeestantaro estas mal-trankviligaj, kion ni nun faru?).

Pri aliaj temoj, vi certe havas ideojn.

Komencantoj kaj komencontoj
Ankaŭ estas bonvenaj ĉe nia(j) tablo(j) !

**10-17** 20h00 BE-Kelmis, Select: "**Konversaciaj tabloj**"

**Ĝeneralaj asembleoj**

Vi estas invitataj ĉeesti la ĝeneralajn asembleojn de *Senlime* kaj Esperantista Grupo Verviers-a, okazontaj en B-Kelmis (Select, Lutticherstr. 264), la 21an de novembro, de la 20a ĝis la 22a horo, kun jena tagordo :

- oficialigo de la membro-listo
- starigo de la ĉeestantara listo
- kontrolo de la mandatoj
- raporto de la ĝenerala sekretario
- raporto de la kasisto
- jura aprobo de la komitato
- estonta agado de Senlime/EGV
- (re)elekto de la komitatanoj
- diversaĵoj

Ni rememorigas al vi ke nur kotizinta membro rajtas voĉdoni kaj kandidatiĝi kiel komitatano.

Membro kotizinta kaj malhelpata ĉeesti rajtas doni skribitan mandaton al alia persono.

Ĉia temo povos estis pritraktita fine de la asembleo, post aŭ kadre de la «diversaĵoj» sed la ĝenerala sekretario rajtas mallongigi la debatojn pro manko da tempo.

Bonvenon al ĉiuj !

La registro enhavanta la oficialajn dokumentojn de ***Senlime*** kaj E.G.V. estos konsultebla de la (kotizintaj) membroj en la sidejo de la asocio ***Senlime***, str. J. Wauters 5, BE-4800 VERVIERS

**11-21** 20h00 BE-Kelmis, Select: **Ĝeneralaj asembleoj de Senlime kaj E.G.V.**

# ESPERANTO✪

## Eŭregiona kalendaro 2014-2015 (1/2)




***Senlime*** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro : Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

*Pro la ferioj, vojaĝa epoko por multaj esperantistoj, ni ne kunvenos (en Kelmis) dum julio kaj aŭgusto.*

**09-19** 20h00 BE-Kelmis, Select: **vespero pri la homaj rajtoj**.
Inf. jacques@senlime.org

**10-17** 20h00 BE-Kelmis, Select: **konversaciaj tabloj**.
Inf. jacques@senlime.org

**11-21** 20h00 BE-Kelmis, Select: **Ĝeneralaj asembleoj de *Senlime* kaj esperantista grupo de Verviers**.
Inf. jacques@senlime.org

**12-14** Dato konfirmota, horo kaj loko decidotaj:
**Zamenhof-festo.**
Inf. jacques@senlime.org

Pliaj kunvenoj verŝajne okazos en Kelmis (Select) ek de la 20-a de marto (post la vintra periodo).

Kurso por komencantoj okazas en Verviers ĉiun ĵaŭdon (9h30-11h30) en Verviers (salonego «Les Minières»).

*Pendant les vacances, temps des voyages pour beaucoup d'espérantistes, nous ne nous réunirons pas (à La Calamine).*

**19-09** 20h00 BE-Kelmis, Select: **soirée des Droits de l'Homme**.
Inf. jacques@senlime.org

**17-10** 20h00 BE-Kelmis, Select: **tables de conversa-tion**.
Inf. jacques@senlime.org

**21-11** 20h00 BE-Kelmis, Select: **Ass. générales de *Senlime* et du groupe espérantiste de Verviers*.***
Inf. jacques@senlime.org

**14-12** Date à confirmer, lieu et heure à décider :
**Fête Zamenhof.**
Inf. jacques@senlime.org

D'autres réunions auront vraisem-blablement lieu à La Calamine (Sélect) à partir du 20 mars (après la période hivernale).

Un cours pour débutants a lieu à Verviers chaque jeudi (9h30-11h30) à Verviers (salle «Les Minières»).

# Novaĵoj pri KELMIS-AMIKEJ✪

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «***Amikejo***»)

**Facebook**

Ni invitas vin malkovri la paĝon de la «**Groupe espérantiste de Verviers**» ĉe Facebook/Fesbuk (paĝo precipe franclingva sed…). Helpu nin pligrandigi nian publikon…"Like"/Ŝat-u nin!

**Filmaj surtekstoj**

***Senlime*** (Esperantista Grupo Verviers) antaŭ nelonge publikigis surtekstojn por plia filmo: la argentina verko de Lucia **Penzo** "***El Medico alleman***" (Wakolda - **La germana kuracisto**), konsiderita kiel la plej bona Arĝentina filmo de la jaro 2013.




En Arĝentino, en 1960, la doktoro Mengele, nazio postkurita pro siaj militaj krimoj, sennome enŝoviĝas en familion de honestaj arĝentinaj civitanoj, kies filineto tro malfrue kreskas, kaj kies patrino atendos ĝemelojn... Tre afable, la viro komencas kurace "helpi" la familion...

Jen filmo subtila, kun tre belaj vidaĵoj el Patagonio. Le stilo de L. **Penzo** iomete rememorigas tiun de Carlos **Saurin**, eĉ se la temo ĉi-tie estas multe pli serioza ol tiuj, kiujn pritraktas la talenta arĝentina realigisto.

Konsilinda, kaj fone kaj forme, tiu fascina filmo tute subtila, inter historia trilero kaj pentraĵo pri la adoleskeco, estas aparte videnda de la esperantistoj kiuj iros tiun jaron al la 99a universala kongreso de esperanto en Buenos-Ajreso.

Kiel kutime, tiuj surtekstoj (sed ne la filmo mem, pro kopirajtaj problemoj) estas elŝuteblaj je http://www.senlime.be/_sgg/m1m8_1.htm

La filmeto pri «**la pajlaj ĉapeloj el la valo de l'Geer** » estas nun videbla, kun la esperanto-surtekstoj sur YouTube.

**KELMIS**
KOMUNUMA KONSILANTARO

La urba konsilantaro de Kelmis ĵus prenis la gravan decidon starigi "konsulteblan konsilantaron por turismo" kaj alian "por la protekto de monumentoj kaj de la historio de la Kelmis-a urbo".

Efektive, pri turismo multo restas por fari: tial la konsultebla konsilantaro celas kunigi ideojn kaj lokajn agantojn, kaj sinkronigi veran politikon pri turismo.

La historio de la teritorio pri Moresnet-Neutrala (Amikejo) estas agnoskita kiel ununura kaj escepta. Ĉiuj bonvolemuloj estas do petataj eniri komisionon celantan kunigi la postrestaĵojn kaj eviti definitivan malaperon de la spuroj de tiu parto de la loka historio (kiu evidente koncernas esperanton). Ni ĝojas pri la subita intereso de la urba konsilantaro por Amikejo!

**ENEO-VERVIERS (rememorigo)**

"Eneo", movado por la pliaĝuloj (kreita iniciate de la "kristana mutualismo"), organizos kunlabore kun la Esperantista Grupo de Verviers kompletan esperanto-kurson dum la lerneja jaro 2014-2015 (ĉiun ĵaŭdon matene de 9h30 ĝis 11h30, en Verviers, placo de la Generalo Jacques :-).

Tiu kurso - bazita ĉefe sur la pedagogia romaneto "Gerda malaperis" - tamen estos pagenda (4 EUR semajne) kaj rezervita al la membroj de "Eneo" (eblas aliĝi!) pli ol 50 jaraĝaj, kaj krome okazos nur kondiĉe ke la enspezoj kompensu la luprenon de la kursejo... (transdonu la informon: jam eblas aliĝi).

Laŭ la eblecoj, alia kurso eble estos organizita por tiuj, kiuj ne plenumas la kondiĉojn de Eneo (la aliaj kondiĉoj restos pli-malpli la samaj).

Jam de nun eblas informiĝi kaj aliĝi telefeno (087/33.02.92).

**VERVIERS**
**Grava atentigo**

Konsiderante la relativan malsukceson de niaj programeroj en Kelmis, interalie flanke de la eksterlandanoj (DE, NL,…), kiujn ni fakte celis, la kunvenoj kaj prelegoj de la Verviersa grupo verŝajne denove okazos en tiu urbo kaj ne plu en Kelmis-o. Intertempe, Verviersanoj memoru ke eblas kunveturi al Kelmis!

Jean-Marie **Jacques**,
ĝenerala sekretario.

# La Kongreso en Polleur kaj la deklaracio pri "la Rajtoj de la Homo kaj de la Civitano por Franŝimonto"

La **Kongreso en Polleur** estas asembleo kunvenigita la 9an de aŭgusto 1789 de Laurent François **Dethier**, juna advokato, unua demokratia urbestro agnoskita de la estroj de la Lieĝa Princepiskopejo, unu jaron pli frue, kaj urbestro de la ĉef-komunumo Theux.

Al la Kongreso, li estis kunveniginta ĉiujn reprezentantojn de la 5 komunumoj kiuj konsistigis la Franŝimontan regionon (Jalhay, Sart, Spa, Theux kaj Verviers).

Ili elektis la vilaĝon Polleur ĉar tiu-ĉi estis la loko geografie plej bone situita inter la kvin komunumoj, precize ĉe la kruciĝo de la vojoj kiuj kondukis al ili: ĉiu laŭiris parton de la vojo por renkonti la aliajn kaj tiel asertis sian intencon komuniki kaj konstrui.


Tiel tiu kongreso eknomiĝis "**Kongreso en Polleur**".

Dum la kvina kunveno, fine de la debatoj, la asembleo unuanime aprobis "Deklaracion pri la Rajtoj de la Homo kaj de la Civitano por Franŝimonto" en kiu L.F. Dethier formulis la bazajn principojn de la modernaj demokratioj.

200 jarojn poste, la 15an kaj 16an de septembro 1989, la ASPC "Congrès de Polleur" (Kongreso en Polleur) tie organizis novan pripensigan kongreson pri nia epoko, pri niaj institucioj, pri la grandaj evoluoj ekonomiaj, politikaj kaj sociaj, pri la progresoj sciencaj kaj teknologiaj kaj pri la estonta influo de tiuj progresoj koncerne la rajtojn kaj liberojn de la homoj "hodiaŭaj kaj morgaŭaj".

La respekto de la rajtoj kaj de la liberoj koncernas ĉiun, ĝi ĉiutage lernendas kaj konstruendas. Tial la ASPC donis al si la celon konsciigi kiel eble plej multajn personojn pri tiuj problemoj. Por atingi tiun celon, estis interalie decidite krei "vojon al la Homaj Rajtoj".

Tiel, ĉiu komunumo, urbo aŭ vilaĝo en la Franŝimonta regiono starigis, en paca loko favoranta la pripensadon (ĝardenplaco kun benkoj, arboj, k.t.p....), memorigan steleon. Sur ĉiu el tiuj steleoj kuŝas pripensiga teksto pri la Rajtoj kaj la Liberoj de la Homoj, daŭra plilongigo de la Kongresaj pripensadoj, kaj unu el la 16 artikoloj de la Deklaracio...



En septembro 2014, oni festos en Polleur la 25an datrevenon de la kreo de tiu vojo per prelegoj kaj solenaĵoj diversaj. Ni rete informos vin pri tio, kiam la detaloj estos al ni konatigitaj.

En Vervierso, en trankvila parko fronte al la granda teatro, staras la memorŝtono kun jena pensiga teksto :

*Vi, kiu pasas ĉi-tie*
*Pensu pri la rajtoj*
*kaj la liberoj de la homoj,*

*Pri tiuj kiuj estas malliberaj*
*pro sia kondiĉo*
*aŭ trudataj de iu povo.*

*Pensu pri tiuj kiuj uzas*
*siajn rajtojn*
*kaj siajn liberojn sen konscio.*

*Pri tiuj kiuj scias kaj asertas*
*ke ĉiuj homoj naskiĝas kaj*
*postrestas liberaj kaj egalrajtaj.*

*Pensu pri tiuj kiuj agnoskas ke la*
*Homaro serĉas la kondiĉojn de*
*siaj rajtoj kaj la limojn*
*de siaj liberoj.*

*Pensu, pripensu kaj laboru,*
*alportu vian ŝtonon prefere ol*
*vian timon.*
*Sed precipe amu la Homojn*
*ĉar ili estas kiel vi.*

Artikolo 3a

Ĉia suvereneco esence fondiĝas en la popolo: nenia korpo, nenia individuo rajtas uzi aŭtoritaton kiu ne malimplice devenas el ĝi.

**V**erviersa **A**ngulo

**V**erviersa **E**speranto **G**rupo

# Le «Congrès de Polleur» et les Droits de l'Homme

**Comité de V.E.G.**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

---

Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
Secrétaire : Claude GLADY
Rue du Culot, 1
5630 CERFONTAINE
Tél. 071 644 916 cglady@arcadis.be

---

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année leur(s) cotisation(s) au compte :

IBAN : **BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)

de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

*Ce bulletin d'information est également intégré à la revue de A.P.E. («Espéranto en marche») dans laquelle vous trouverez les montants des abonnements et cotisations à APE et/ou UEA.*

*La cotisation pour **Senlime** reste fixée à **10 Euros** (mais les dons sont également bienvenus).*

**Indiquez les nom, prénom et domicile du membre cotisant ainsi que le motif du paiement:**
***«cotisation de.... pour....».***

**D'avance, merci à tous !**

*En septembre 2014, nous fêterons le 25e anniversaire de la création – en présence de nombreux espérantistes des 3 pays voisins - d'une «**route des Droits de l'Homme**» commémorant, à travers toutes les communes de l'ancien marquisat de Franchimont, la «**Déclaration des Droits de l'Homme et du Citoyen pour le Franchimont**» (Congrès de Polleur - 1789).*

*Nous ne manquerons pas de vous transmettre, par internet, au fur et à mesure qu'elles nous parviendront, les informations sur ces diverses manifestations, festivités, conférences, etc….*

**Video** à voir sur internet :
https://www.youtube.com/watch?v=mg-uqv4tOHA

---

Autrefois le Marquisat de Franchimont fut une terre liégeoise, arrosée par la Hoegne, et un site de contrastes partagé entre un monde rural pauvre et des pôles industriels dont Verviers est l'exemple fameux.

Dans le réseau des tensions sociales et le remous des espaces culturels, engendrés par la lente durée des archaïsmes et le dynamisme des expansions, il y a eu place pour un souci démocratique dont 1789 est l'un des soubresauts décisifs.

En vérité, l'histoire du Marquisat de Franchimont nous démontre qu'il n'y a pas de petite histoire, mais des histoires qui se chevauchent et qui s'intègrent dans des horizons de compréhension plus large, efforts de synthèse où la recherche de l'identité n'est jamais absente, attisée par la conscience des hommes qui en sont les sujets, mais qui sont aussi des citoyens.

Les chemins de Franchimont, comme les chemins de l'Histoire, comme ses ondulations infinies, sont imprégnées de mémoire, qui, assimilée, a enfin le goût suprême de la liberté.

Philippe **Raxhon**

---

## Nouveaux cours d'ESPERANTO à Verviers

dès septembre : 35 x 2 heures
+ textes imprimés, CD, DVD, …
+ possibilité de participer ensuite aux réunions du groupe à Verviers et aux autres activités espérantistes (dont le 100e congrès universel à Lille), etc.

Renseignements et inscription (obligatoire) : 087/33.02.92

Connaissant l'espéranto, vous pourrez apprendre plus facilement l'anglais (et les autres langues). Pourquoi et comment? Vojez la video :
https://www.youtube.com/watch?v=QDrIchR8bUo